Bimestriel culturel d'information & d'expression espérantiste
Dumonata kultura informilo k esprimilo esperantista. 2,50 FF
No 25 (43) - Februaro/Marto 1980.
ISSN 0150-5823




Eldonas: Cercle espérantiste de l'Agenais, F 47340 LAROQUE
Poŝtkonto: 3 371.74 M Bordeaux

Abono por unu jaro : 15 FF (12 FF por Francio) al la ĉi-apuda pĉk.

****************************************************************

# Enhavo


Larzak-informoj (Nicole) .....2
Nia debato : Armado (I) (Kribo, J.G.,Jakelino,Ĵansebo)...3
13a Internacia Renkontiĝo de Freinet-Edukistoj (ICEM)...11
Ĉies tribuno : Respondo al Valo (Dek). ...12
Responde al respondo (Valo) ...12
Ĉu Z. estis virokrato? (H.Elik) ...13
Protestletero (R.Sarroca) ...14
Nia krimfelietono (Jakelino). Legindaĵo (J.G.) ...16
Vivo de "Laŭte!". Broŝurservo de SAT (Kribo) ...17
Nia pasintjara felietono : Tra Eŭropo per fervojo kaj esperanto (Jakelino) ...21
Esperanto-gramoj (Antoni Madej) ...24
Nia kutima felietono : Tra la mondo per biciklo (Alfa-Beta) ...25
La Lampisto estas la vera kulpulo (Boris Vian) ...27

---

Vivo en la esperanto-grupoj (koloraj paĝoj) I/IV.


Ĝirondio, Larzako, Paŭo, Perpinjano, Aĝenio, Muelejoj de Metilernantoj, Alta Elzaco, Sarlando, Tuluzo, Katalunio... kun la komunikoj de la tieaj abonantoj.

Interesovekan legadon al ĉiuj !

## L A R Z A K - I N F O R M O J

La 2an kaj la 3an de februaro okazis en Millau renkontiĝo de komitatoj, asocioj, kiuj subtenas la lukton de la terkulturistoj, por fari bilancon de la nuna situacio kaj starigi projektojn por la venontaj monatoj. Ĉeestis 300 personoj.

Ĉiuj juristaj apelacioj estis uzitaj ; nun la terkulturistoj atendas respondon de la lasta apelacio ĉe la kasacia kortumo. Ili tute ne rezignas, kaj starigas ekde nun mutualistan kompanion por financaj subtenoj : Se vi estas sindonemaj riĉuloj, vi povas ŝparloki monon sen ia profito en tiu nova banko. (Vi havos pli da informoj, skribante al Coopérative Agricole, rue Glossops, 12100 MILLAU.)

En 1979 la buĝeto de A.P.A.L. estis 50 milionoj (52% el impost-rifuzantoj).
C.U.N. organizis 11 sesiojn (pri neperforta alternativo) dum la somero 1979, kaj organizos 15 "semajnojn" dum la somero 1980.
Larzak-Universitato helpas al realigo de ekologiaj esploroj, kaj organizas konferencojn.
La ĉefa afero eble estos la laborejoj, kiuj funkcios dum la somero 1980, ili estos pli precize organizitaj kaj 4 informejoj estos malfermitaj sur Larzako kaj en Millau.
La 1100 soldat-libretoj senditaj al U.N.O. revenis "sen brue" sur Larzakon, ili denove iris al nia estro de la francaj armeoj, S-ro Giscard d'Estaing.
Dum Pentekosto okazos alia grava renkontiĝo pri la temo "La liberecoj". Ĉar estis multaj diskutoj kaj informoj pri la armeizado de nia socio, pri la multnombraj procesoj, kondamnoj de militrifuzantoj, de pacistoj, de regionistoj...
La gazeto "Gardarem lo Larzac" bezonas novajn abonantojn. (Ne forgesu : 30 F, jara abono, ĉe GLL, Potensac, 12100 MILLAU, pĉk : 217530 S Montpellier).
Per tiu gazeto vi havos pli precizajn informojn, ĉar mi donis nur resuman klarigon pri tiu mirinda fenomeno, kiu estas la Larzaka afero.

Nicole

15.16.Marto : E-kunveno sur Larzako! Legu en la koloraj paĝoj.

Nia dua debato per "ĉenleteroj" : 
******************************

# Armado

Proponita kiel unu el tri diskuttemoj en la SAT-Amikara kongreso en Avinjono, "Armado" fakte ne logis diskutemulojn, kiuj preferis konservi ĝin por venonta okazo. Pri tiu ĉi temo mi notis nur skemon kaj kelkajn ideojn, kiuj eble utilos por debato. Kribo.

1. Pristudado de la fenomeno.

Laŭ mi, la "naturaj" fontoj de "armado" estas jenaj :
- la homo kiel ĉiuj bestoj bezonas sekurecon ;
- la timo antaŭ ĉio nekonata kaŭzas la agresemon ; en la pratempo la vivilo estis ofte samtempe armilo ;
- por plejeble certigi sian sekurecon la homoj, la tribo, elpensis, fabrikis armilojn por ataki kaj sin defendi.

Dum la historia evoluado la tasko certigi la sekurecon de la homoj estis transprenita de "fakuloj" por pli kaj pli multhomaj socigrupoj : komunumoj, regionoj, ĝis la nunaj naciŝtatoj kaj blokoj, kiuj fakte estas la rezultato de longa sinsekvo de militoj.
Tutnature la aŭtoritato-potenco, kiu regis la socigrupojn, sin apogis kaj sin apogas plu sur la armita forto, kiu cetere fariĝis uzebla tiel kontraŭ la "ekstera malamilo", kiel kontraŭ la interna, t.e. kontraŭ tiuj, kiuj ne volas submetiĝi al la establita, centra aŭtoritato. Sed tiu armita forto, la armeo, povas konsistigi ankaŭ danĝeron kontraŭ la aŭtoritato, kies reprezentantojn ĝi laŭvole povas forigi, starigi, influpremi.
Sur la ekonomia kampo, pli kaj pli multnombra laboristaro laboras por la armeo (scienculoj, inĝenieroj, ordinaraj laboristoj) kaj tiel havas pli kaj pli gravan pezon en la ekonomia sistemo.
En tiu sistemo bazita sur la produktado/vendado por akiri

profiton, la armado fariĝis terura kancero, kiu pli kaj pli invadas kaj infektas la tutan socion. Ĝi kuntrenis :
- la konstruadon de atomcentraloj kaj ilian disvendadon al ĉiuspecaj reĝimoj en la tuta mondo ;
- la armeizadon de la socio ekde la infanaĝo (per filmoj, armil-ludiloj, ktp).

2. Lukti kontraŭ la armado.

Por lukti kontraŭ tiu terura homa fenomeno, necesas unue bone kompreni la devenon de tiu sekur-bezono, de la natura agresemo de la homo kiel specio ; due, konscii pri ĉiuj faktoroj, kiuj plu tenas vigla la agresemon : rasismo, ekonomia malegaleco, lingva ĥaoso, naciismo kaj centralizismo ; envojiĝi mem alian viv- kaj sent-manieron, kiu igu la armilaron senutila, unuvorte, malarmi la mensojn. "Neperforto, esperanto, ekologio, socia justo" estas vortoj, kiujn necesas transformi en agojn per la ĉiutaga praktikado.
Kion fari povas ni, esp-istoj ? Favori pli bonan interkomprenon inter la diversnaciaj homoj, individue agi por malarmiĝo de la mensoj (kio ŝajnas al mi preskaŭ kolosa tasko!); helpi sur la lingva tereno al ĉiuj movadoj, kiuj laboras direkte al humaniĝo de la homa vivo (etnismaj movadoj, mondcivitanoj, ekologianoj, neperfortuloj, ktp...). Kompreneble, tiom longe kiom la E-movado restas afero de treeta malplimulto(kaj tio verŝajne tiel plu daŭros jardekojn eĉ jarcentojn, se la homa specio plu plagas...) ni ne iluziiĝu pri la rezultoj, des pli ke nur kelkaj inter la esperantistaro emas kaj povas efektive aktivi sur tiu ĉi kampo.

Kribo.

Nun en la mondo ĉiu kvina inĝeniero kaj teknikisto laboras je militaj celoj. Estas same pri la riĉaĵoj de "niaj nacioj" : 80 % el la elektroniko konsistas el militaj mendoj ; 270 000 personoj en Francio produktas armilojn ; 500 000 laboras rekte aŭ malrekte por la armado, 1 miliono se oni nombras la militan dungitaron : la ĉefa amaso de la aktiva loĝantaro ; 16 % el la francaj eksportaĵoj estas armiloj, 50 % se oni konsideras nur la avangardajn teknikojn.

Post la dua mondmilito Japanio kaj Federacia Germanio devis rekonstrui ĉion, krom la armado, kun la helpo de la usona



kapitalismo tiuj landoj sin antaŭenĵetis en grandegan industrian klopodon. En Francio la nuklea milit-materialo induktis la veran industrian ekmoviĝon : vidu la sukceson de la "Mirage" de Dassault disvendataj en la tuta mondo!

La armiloj estas la nura produktaĵo, kies merkato estas ĉiam garantiita.
La korea milito donis viglan impulson al la usona industrio. La Kippur-milito en Izraelio detruis en dek-kvin tagoj la dekjaran produkton de tankoj.
Ekzistas en la disvolvataj landoj "kvara sektoro" de la ekonomio, nome tiu de la detruiloj, kies rolo estas grava.
La kontraŭ-gerila tekniko, la teknologio kontraŭ revoluciemo grava konsumas laserajn radiojn kaj aliajn elektronikaĵojn. La Kippur-milito progresigis la teknikon de la gvidataj misiloj kaj la strataj bataloj de Bejruto la materialon por urba batalo. Sama afero en Irlando, ktp.
Do oni vidas, kiel estas ligitaj la ekzisto de armado kaj la ekonomio de merkato, tiel en la "kapitalismaj landoj", kiel en la "socialismaj landoj".

La malapero de armado supozigas tute alian socian organizon, celantan la produktadon de utilaj iloj sen celo al profito aŭ subpremo.
La timo kontraŭ la "ekstera malamiko" zorge elvokata de la diversaj registaroj estas la preteksto por la konservo kaj disvolvo de la armado, kies ĉefa rolo estas la daŭrigo de diktaturaj sistemoj (vidu Sud-Amerikon) kaj la varbado de la junularo tro liberema en niaj "antaŭenaj demokratioj".

J.G.

(La ciferoj estas ĉerpitaj el la franca gazeto "Libération").

Laŭdparolo pri agresemo.

Mi tute malŝatas la moralajn predikojn, laŭ kiuj homo devas rezigni pri sia natura agresemo, por ke naskiĝu paca mondo. Tia ideologio favoras nur al la ekspluatistoj, kaj finfine ankaŭ al la militoj.

De mia plej juna infanaĝo gepatroj kaj instruistoj provis bremsi en mi la agresemon. Mi devis esti saĝa knabino,

ne tro laŭte paroli, fari, kio estas al mi ordonata, sen ribeli, ne kvereli kun aliaj infanoj, ne kritiki plenaĝulojn, ktp, ktp, ktp. Kiuj estis la rezultoj de tiu edukado ? Fakte, ili estis por mi aparte katastrofaj, sed ne tio estas la temo de la hodiaŭa debato, pri la "infana kondiĉo" mi jam enkondukis debaton en LJP. Mi citas en la hodiaŭa debato nur jenan ekzemplon : kun 10 jaroj, mi estis en liceo, iu infano de nia klaso faris stultaĵon, oni ne sciis, kiu el ni, tial la tuta klaso devis skribi 100 liniojn kiel kolektivan punon. Miaj gepatroj opiniis la punon maljusta, ĉiuj plenaĝuloj, kiujn mi konis, opiniis la punon maljusta, sed mi skribis la 100 liniojn da puno, ankaŭ la 38 aliaj nekulpantoj de la klaso ilin skribis, neniu protestis, neniu kriis, ke estas maljustaĵo, ke 39 senkulpuloj estas punataj, ĉiuj obeis kaj silentis. Ĉiuj estis bonedukitaj infanoj : kun 10 jaroj ili jam estis perdintaj ĉian agresemon.
Kion oni tiam instruis al ni ? Kio estis la konduto de la gardisto de la liceo, krom ostaĝprenado ? Oni tutsimple instruis al 39 infanoj akcepti maljustaĵon, silenti antaŭ la aŭtoritato, malkuraĝe rezignacii. Kiom el ni 39 senkulpuloj 10 jarojn poste silentis, kiam la registaro de nia lando faris ian ajn maljustaĵon ? Sukcesa estis nia eduko : oni mortigis en ni la agresemon.
Kies intereso estas tiel mortigi en ni la agresemon ? Kompreneble, estas la intereso de la reganta klaso, kiu tre timas, ke ni ĝin agresu por rehavigi al ni la povon, kiun ĝi forŝtelis de ni. Tial oni de la infanaĝo nin (eble pli la inojn) edukas tiel, ke ni anstataŭigu agresemon per pasivemo.
Tiun pasivemon, kiun mia eduko metis en min, kiom da fojoj mi devis ĝin skui por fariĝi iom taŭga neperforta aktivantino ! Mi estas tre timema persono, postulas de mi grandan klopodon alparoli homojn por subskribigi petskribon, diskuti kun pasantoj ĉe disdonado de flugfolioj, ktp, ktp. Kiom mi bedaŭris, ke mi iam estis tro saĝa infano, kaj nun devas lukti kontraŭ tiu emo ! Ĉiam mi devis repensi pri la maljustaĵo, kontraŭ kiu mi estis batalanta, mi devis rekonsciiĝi pri la neceso, ke iu luktu kontraŭ ĝi, kunigi miajn mensajn fortojn, por reveki la agresemon, kiu dormetis en mi, kiun mia tuta eduko estis celinta mortigi jam en la ovo.
Tamen agresemo estas tiom natura emo en la homa menso, tiom necesa defendreago de subprematoj, ke malfacile estas por la reganta klaso ĝin tute mortigi. Kiam la situacio, aparte la ekonomia situacio, fariĝas malpli kaj malpli eltenebla, kreskas la agresemo de la subprematoj. Tiam la reganta klaso, por ne esti mem agresata, devas eltrovi trompon : ĝi donas al la subprematoj alian malamikon ol sin mem, por deturni ĝian agresemon.
En siaj verkoj "La Violence et le sacré" (Perforto kaj sankteco), kaj "Des Choses cachées depuis la fondation du monde" (Aferoj kaŝitaj ekde la fondado de la mondo), kies legado estas konsilinda al ĉiuj neperfortaj aktivantoj, antropologo René GIRARD eĉ asertas, ke la praktiko de la "propeka kapro" estas la fundamenta praktiko de ĉiu homa socio : kiam en kolektivo okazas rivalecoj, kiuj minacas la unuecon kaj pluvivon de la kolektivo, oni restarigas la koherecon kunigante ĉies agresemon al unu viktimo, kiun la tuta kolektivo mortigas. Poste tiu viktimo, kies morto repacigis la kolektivon, fariĝas ĝia dio. En pli superaj niveloj de la evoluo, la homa viktimo estas anstataŭata per besto (kiel la propeka kapro de la izraelidoj), aŭ la ofero fariĝas simbola (kiel la meso de la katolikoj).

Tamen, eĉ en nia epoko, la praa praktiko kunigi la agresemon de tuta popolo kontraŭ homajn viktimojn plu estas uzata de la reganta klaso por restarigi "socian pacon", siaprofite, kompreneble. Post la unua mondmilito, la neatendita katastrofega malvenko kaj la kondiĉoj trudataj de la venkintoj per la traktato de Versajlo kreis en Germanio mizeregon : la senlaboreco estis grandega, la inflacio vere astronomieca, la politika stabileco nenia. Tial la popolo fariĝis pli kaj pli agresema, kaj komencis krei sovetojn. La burĝaro tiam alvokis al Hitler, kiu trovis la solvon. Kiuj kulpas pri la senlaboreco ? La judoj ! Kiuj kulpas pri la senvaloriĝo de la marko ? La judoj ! Kiuj kulpas pri la perdita milito ? La judoj ! Oni konas la rezulton de tiu propagando, kiu, bone atentu, ne komenciĝis en 1939, sed ja en 1921 (dato de fondado de NSDAP).

Nun estas ekonomia krizo, kvankam multe malpli grava. Kiuj responsas pri la senlaboreco ? La gastlaboristoj ! Kiuj responsas pri la deficito de la socia asekuro ? La gastlaboristoj ! Kiuj responsas pri la manko de energio ? La alilandanoj, kies reprezentantoj ĉe ni estas la gastlabor-

istoj. Ktp, ktp. Refunkcias la praa metodo de la propeka kapro, kiun la reganta klaso uzas, kiam ĝi ne plu sukcesas mortigi la agresemon de la popolo. La problemo do tute ne estas mem mortigi nian agresemon, kiun ni bezonas por nin kaj aliajn defendi kontraŭ subpremado, sed bone rekoni niajn malamikojn, kaj eltrovi la manierojn repreni nian vivon en niajn proprajn manojn, sen ĝin doni al nova reganta klaso. Tio ja postulas agresemon, kaj tio postulas ankaŭ inteligentecon, imagpovon, kaj humuron. Jam Tolstoj diris, ke pafi al la caro helpas al nenio, ankaŭ ne helpas resti hejme, se miloj da samlandanoj dum tiu tempo iras al milito. La problemo estas bone majstri nian agresemon, kaj ĝin uzi por vera liberigado, agresante la nunan regantan klason, sed sen rekrei estontajn mastrojn. Laŭ mia opinio, uzo de perforto, misnomata revolucia, ĉiam rekreas novan regantan klason, kiun oni devas ree agresi, kaj nur rekomenciĝas nova infera cirklo de la historio.

Eble iuj pensas, ke de pli ol unu paĝo mi parolas pri io tute alia ol la temo de la diskuto, t.e. armado. Sed armiloj utilas al nenio, se estas neniu por ilin porti. Eĉ moderna milito ne povas disvolviĝi sen la konsento de plimulto de la popolo. Tial, tiom grava por la milito, kiom armado, estas la propagando, t.e. la "psikologia milito". K-do Goering, responsa pri propagando, certe faris pli por sia partio kaj por la milito, ol faris multaj naziaj generaloj. La armilo de Goering estis tiam la radio. De tiu tempo disvolviĝis alia terura armilo : la televido. La televido estas ekzakte la malo de la cenzuro : per la cenzuro, la ŝtato malpermesas al ni, kion ni NE devas rigardi ; per la televido (kiam ĝi estas ŝtatmonopolo, kiel en Francio), la ŝtato trudas al ni, kion ni JA devas rigardi. Kompreneble, tiu lasta metodo estas multe pli efika. Granda paŝo al ĝenerala malarmado estos farita, kiam estos frakasitaj en Francio ĉiuj televidiloj. Preferinde estus, ke ili restu, kaj havigu al ĉiu parolrajton, sed tio supozigas, ke jam estus farita la revolucio, do infera cirklo.

Al tiuj, kiuj pensas, ke mi tute ne traktis la temon "Armado", mi atentigas, ke ekzakte la saman malvirton havas militistoj kaj pacistoj : same kiel militistoj ĉiam tre bone scias, kiel ili devas gajni la ĵus perditan militon, same pacistoj tre bone scias, kiel eviti la ĵus okazintan militon.



Estas ja skribite en tute oficialaj juraj tekstoj de la Franca Respubliko, ke ne plu ekzistas la militotempo kaj la pacotempo. Iam ajn, se ĝi opinias sin "minacata", la registaro povas meti la civitanaron en staton de defendo. Kio estas defendo ? Ne nur armeo kaj armiloj, sed defendo estas la tuta aktivado de la socio repensita por defenda celo (difinita de la registaro, kompreneble). Ne ekzistas distingo inter armeano kaj civitano : iu ajn homo partoprenas en la defendo per iu ajn aktivado. Ankaŭ ne plu ekzistas distingo inter armilo kaj iu ajn varo produktata de la nacio. Jam iu irana barbulo montras, ke petrolo estas armilo. Pro kiu armilo estos mortintaj fine de 1979 50 milionoj da homoj, inter kiuj 17 milionoj da infanoj ? Ĉu pro la N-bombo ? Ne, pro malsato. La plej potenca armilo de la hodiaŭa milito estas tritiko.

Ĉu UPF* volas instigi leĝproponon, ke Francio rezignu pri produktado de tritiko ? La debatoj pri armado, ĝenerala malarmado, unuflanka malarmiĝo, ktp, estas nur debatoj pri la maniero eviti la jam pasintajn militojn. La hodiaŭa situacio estas, ke ne plu ekzistas civiluloj, ĉiuj homoj estas militistoj ; ne plu ekzistas civilaj produktoj, la tuta produktado estas pormilita, ne nur la bomboj kaj la tankoj, sed la tuto de la ekonomio, ne plu ekzistas paco, ĉiumomente la nacio sin defendas.
Tial la problemo estas : kiel nin defendi kontraŭ la militeco de nia tuta vivo individua kaj kolektiva ? Kiel repreni nian povon en niajn manojn, kiel refariĝi civiluloj ?

La aserto, ke ni ne devas nin defendi, estas nur maniero entombigi la debaton...

Jakelino.

*UPF : Union pacifiste de France (Pacista Unio Francia).(red)

- Tute trafa la kontribuo de Jakelino, ĉu ne ? Fakte, ĉiu havu propran manieron trakti la diversajn temojn. Nur tiel okazas vera debato, en kiu ĉiu riĉiĝas per la aliulaj ideoj. Jen nun, post tiu paŭzeto, la kontribuo de Ĵansebo :

---

ankaŭ nemembro de ĉenleteroj povas kontribui! ne hezitu!

## Agi por malamiĝo de la mensoj...

### Forigi la militojn

La problemo ne estas armado, sed milito mem. Armado estas nur konsekvenco de la militoj, ne de la kapitalista sistemo. Homoj mortigis sin reciproke longtempe antaŭ la atombombo, la pafilo kaj eĉ la arko. Ankaŭ socialistaj landoj militas kontraŭ siaj najbaroj, socialistaj aŭ ne.

Iu ajn bezonas sin defendi. Se oni akceptas, ke oni sin defendas, oni akceptas la logikon de la armado : des pli da defendendaĵoj, ju pli da defendiloj. Do la mondo devas organiziĝi tiel, ke sin defendi iĝu ne plu necesa.

### Io ajn estas armilo

Se ili estus ne plu fabrikataj, oni ĉiam povus uzi bastonojn aŭ ŝtonojn por sin defendi aŭ por ataki aliajn. Nunaj ekzemploj montras, ke petrolo, tritiko aŭ iu ajn ĉantaĝilo povas esti armilo. Sed la plej danĝera armilo estas la homo mem : Tiu, kiu faras militojn, kiu estas rasisto, kiu estas atakema aŭ bezonas sekurecon.

### Nek agresemo estas natura

Ĝi ne estas pli natura ol pasiveco. Certe, ni bezonas foje agresemon : kiam ni estas - fakte - fronte al danĝero. Sed kiam ne estas minaco, agresemo estas nur ankaŭ la rezulto de nia "judkristana" edukado, kiu rifuzas al ni la rajton al plezuro, kiu igas nin frustritaj, kaj nur en dua etapo oni malpermesas al ni esprimi nian agresemon : Tiam ni estas tiel kontroleblaj kiel dresitaj hundoj. Oni povas direkti nian agresemon, laŭvole aŭ al laboro, aŭ kontraŭ iu ajn, aŭ kontraŭ ni mem.

### Ŝanĝi la pensmanieron

La plej danĝeraj armiloj estas en niaj mensoj. Ni devas esti kapablaj pensi per ni mem kaj helpi aliajn por tion fari. Afero ne estas bona aŭ malbona. Estas bono kaj malbono en ĉiu afero.

Diri, ke rasismo estas malbona ne estas efika metodo : ĝi funkcias nur ĝis kiam unu alia diras la malon. Sed klarigi kial rasismo estas neracia sinteno estigas pli malrapidajn sed pli certajn rezultojn.



Ni devas do malfidi maniĥeismon, esti toleremaj kaj provi kompreni la mekanismojn de la militoj. - same kiel medicinaj serĉistoj pri kancero.

Mi opinias, ke esperantistoj, per sia internacia reto de komunikado, povas ludi specialan rolon en tiu afero.

Ĵansebo.

Red. : Tiel finiĝas la unua parto de nia debato per ĉenletero pri "Armado". La dua parto trovos lokon en la venonta numero.

---

## La 13a INTERNACIA RENKONTIĜO DE FREINET-EDUKISTOJ

Organizita de la Internacia Federacio de la Movadoj por Moderna Pedagogio (F.I.M.E.M. - Freinet-Pedagogio), la 13a Internacia Renkontiĝo de Freinet-Edukistoj (RIDEF) okazos en 1980 en MADRIDO (Hispanio) de la 17a ĝis la 27a de julio. Por informoj kaj enskribiĝo sin turni al :

Baltazar Roman UBEDA, C/Zurbano 63-6°, MADRID 10, Hispanio.

Por la Francoj, skribi al : FIMEM, Roger UEBERSCHLAG, 42 Gde Rue, 92310 SEVRES, Francio.

I.C.E.M.-Esperanto (Komisiono de Kooperativa Instituto pri Moderna Pedagogio) proponas du renkontiĝojn en Francio :

- en LA TURMELIERE (inter Angers kaj Nantes), de la 3a ĝis la 14a de aŭgusto 1980, pri studado kaj praktikado de Esperanto, per natura metodo, en ripoziga medio, dum komuna vivo, ekskursoj, promenadoj, vizitoj kaj eventuale renkontoj kun aliaj esp.-grupoj. Por klarigoj kaj aliĝilo sin turni al : Paul POISSON, 239 rue Victor Hugo, ST-CYR-SUR-LOIRE, 37100 TOURS, Francio.
- en CAUDURO, apud Béziers ; agrabla loko por ripozi kun naturaj aktivaĵoj, homaj kontaktoj, manfaradoj, por geesperantistoj, instruistoj aŭ ne. Restado de la 15a ĝis la 25a de julio 1980. Sin turni al : Joelle HUET, 14 rue Choiseul, 91790 BOISSY/ST-YON, Francio.

# ĈIES TRIBUNO

Red.: La artikolo de VALO en "Laŭte!" de januaro trovis eĥon ĉe kelkaj el la legantoj - kaj eĉ ĉe nia kutima malabonínto, kiu, kiel supozeble, plu legas nian bultenon telepatie. Amiko VALO insiste petis, ke ni publikigu la surpaperan kontribuon de nia telepatiulo. Al li li respondas per la sama, ortodoksa, rimedo.

## Respondo al VALO.

Mi legis vian artikolon "Ĉu Zamenhof estis 'Fallokrato' (malfeministo) ?".

En la fino vi faris la demandon : Ĉu harfendaĵo ?

Mi respondas : - Almenaŭ s t u l t a ĵ o pro fuŝa manio de tradukismo.

Cetere kiun pronomon ni uzu por la ideo "gepatroj" kaj la aliaj ge-ojvortoj, kaj se temas pri homo kaj besto, aŭ homo kaj objekto ?

Krome el poezia vidpunkto : se mi verkus poemon pri virinoj mi certe ne uzus "iŝi". Laŭ sonvaloro IŜI estas malvarma vorto. Iŝi rigidigas penison pro frosta sento anstataŭ pro arda amoro.

Fine : se mi estus esperantista junulo mi lanĉus broŝuron "For la tradukismon!" por per tio ŝanĝi la fiaskan pasintecon de ESPERANTO en sukcesan estontecon. Ni bezonas enEsperantopensantajn gejunulojn, ne traduk-aŭtomatojn ! DEK.

## Responde al respondo.

Mi ne volus polemiki, kdo DEK, ĉar same kiel vi, mi aparte ŝatas la originalan literaturon.

Sed, same kiel Zamenhof, Lanti kaj multaj aliaj, mi opinias la tradukon tre utila, ĉar :

1. Ĝi helpas disvastigi tutmonde la verkojn de diverslingvaj aŭtoroj.
2. Ĝi elmontras la taŭgecon de esperanto por tiu celo.
3. La traduklaboro estas bonega ekzercado por akiri kapablon precize esprimi delikatajn pens- kaj sent-nuancojn. (Tiurilate, en originala verkado oni facile cedas al facileco).

Koncerne "iŝi" :

1. Mi ne vidas, kial ĝi estus pli "malvarma" ol "ili"... aŭ "ŝi".
2. Mi ne vidas, kial ĝi estus malpli ekscita por ies peniso ol "ili" - krom se temas eble pri samseksemulo.
3. Mi neniel insistas, ke oni akceptu ĝin.

Simpatie via VALO.



Kribo : Stranga tiu manio enŝovi la penison eĉ en gramatikan diskutadon ! Kaj ĉu ne estas alia maniero senti ion pri virinoj ol per la nura amorilo ?
Ĉu ne tio la fallokratismo ?
Sed, ŝŝtt!, jen konkreta kontribuo al la gramatika afero :

## ĈU ZAMENHOF ESTIS "VIROKRATO" (*)

Aldono al la VALO-artikolo, far H. ELIK.

Estas rimarkinde, ke oni uzas prefikson por signi la virecon ĉe bestoj (vir-bovo, vir-kato, vir-ktp.) sed sufikson por ineco(n) (bov-ino kat-ino ktp-ino).

Kvankam en multaj bestospecoj - precipe mambestoj - uziĝas "prefikse" la viraj seksorganoj, kaj "sufikse" la inaj, tio ne pravigas la neegalan, nesimetrian gramatikan konstruadon. (Tiom pli, ke oni ne konstatas saman "laŭnaturan" konstru-metodon rilate homojn, kio devus esti "virhomo" kaj "inhomo", se fidi la statistikojn, kiuj asertas, ke homoj en pli ol 95 % de la kazoj "prefikse-prefikse" fikas.)

Tamen ne virokrata solvo jam ennestiĝas en Esp-o, sed ĝis nun, ne elfosita, eble pro ĝenerala virokrateco de niaj socioj. Sufiĉas konsideri la karesajn sufiksojn : nj kaj ĉj, kiuj estas ja simetriaj : paĉjo - panjo.

"nj" aperas kiel dolĉigo de "in". Same "ĉj" ekzistas kiel dolĉigo de iu"|iĉ|" ne jam elfosita, sed nepre ekzistanta sufikso.

---

(*) El ĉi tiu artikoleto, estas ja videbla, ke "vir" estas "fallokrata" vorto en si mem - do ne necesas enkonduki neologismon."virokrata" sufiĉas.

Certe Z. nekonscie pensis pri "iĉ" sed ne ĝin naskis pro grava influo de virokrata konformigado.
La kompleta formo estu do rilate bestojn : (kaj homoj kompreneble, kiuj ja estas mambestoj, do bestoj)

| ĝenro | ♂ | ♀ |
|---|---|---|
| ĝi | li | ŝi |
| kato | katiĉo | katino |
| homo | homiĉo | homino |
| ... | ... | ... |

La vortoj "viro" kaj "virino" estas esence "virokrat(ec)aj, iĝi malaperos kune kun virokrateco en la parolata lingvo, (eble plu vivos nur por speguli virokratan sintenon iaman...)

Iĉ ne kontraŭas la fundamenton (ĝi eĉ mankas en ĝi !). Iĉ povas eniri en Esp-on kiel neologisma sufikso. Ĝi ne kreas konfuzojn kun aliaj vortoj (krom kapr-iĉo/kapriĉo - sed ŝajnas facile distingi inter besto kaj muzikaĵo laŭ la kunteksto).

Eble iuj plendemus pro plilongigo de vortoj. Mi dirus, ke boviĉo ne estas pli longa ol vir-bovo kaj se oni plendus pro longeco de vorto kiel "kamaradiĉo" sen plendi pro longeco de "kamaradino", ŝajnas ke "oni" bezonas urĝe malvirokratiĝi.

Plie, enkonduko de iĉ kadukigas la prefikson "GE" (kamaradoj sufiĉas kontraste al "kamaradinoj, "kamaradiĉoj")

Cetere, "UL", kiu aspektas ofte maskla rehavigos al si pli precizan sencon (la uzado de ULINO - virgulino, belulino - vole nevole maskligas la sufikson, kies senco tia tute ne estas.) kaj ĉi tie, ne estas necese plilongigi la vortojn. IN kaj Iĉ havas en si mem la sencon de UL. Sufiĉas anstataŭigi UL per pli preciza sufikso IN aŭ Iĉ, kiam oni bezonas signi la sekson.

- belulo - beliĉo - belino -
ĝi li ŝi

H. ELIK.

## Protestletero de Roza SARROCA

"Mi estis tre surprizita, tralegante "Laŭte!" ĉi-matene (29.12.79). Ankaŭ vi plu silentas pri la atomcentralo de GOLFECH, kiel la oficiala gazetaro, krom "Le Monde" - kaj ne multe. Estas bone marŝadi de Valence ĝis Golfech, sed estus pli bone, laŭ mi, iom paroli pri la afero, pri la pseŭdo-enketo, la policistoj, kiuj tenis en okupacio dum du monatoj 12 vilaĝojn de Tarngaronio, pri la grenadoj, kiujn ricevis, du sinsekvajn sabatojn, la senarmilaj antinukleanoj pro protestsidado kontraŭ policistoj kun armiloj kaj kaskoj, pri la "fendetoj" en la dosieroj de la enketo. Estis 450 "fendetantoj", i.a. kelkaj eminentuloj, pli ol 45 instruistoj, ĉiuj dentistoj, flegistinoj, preskaŭ ĉiuj kuracistoj el Valence, Lamagistère, Auvillar, metilaboristoj, komercistoj, agrokulturistoj, direktoroj de "Agrokultura Kredito" (banko), urbestroj, urbo-konsilantoj, la deputito-urbestro, la prezidantino de la Ĝenerala Konsilio, k.a., "fendetis". Ni elektis neperfortan batalon (...)"



(Nia kamaradino tie aludas pri artikolo aperinta en la CNT-gazeto "Espoir" - de persono, kiu ŝajne bedaŭris, ke ne estis "rekta agado". Al tio nia k-ino rebatas : )

"Kiuj emis batali kontraŭ la policistaĉaro, tiuj povis veni por "fendeti" kaj gustumi la batojn de botoj kaj pugnoj. Tio okazis al pluraj personoj tie ĉi..."

(...kaj bedaŭras jene la mankon de informado en "Laŭte"):

"Mi kredis, ke en "Laŭte!" vi povus raporti pri la manifestacio kaj doni iom da informado pri la regiono kaj ke esperanto estas rimedo por konigi al alilokaj esperantistoj, trans la landlimoj, la problemojn de la homoj, kiuj timas la atomcentralojn. Mi eraris ! Jes, mi legis la artikoleton pri la tezo de D-ro Dufetelle. Estas bone. Ankaŭ li "gustumis" la botojn de la policistaĉoj en GOLFECH (8-taga labornekapablo). Protestas la abonantino de "Laŭte!"...

R. Sarroca (esp-igis la red.)

La red. respondas :

Mi komprenas la proteston de nia amikino. Sed "Laŭte!" povas aperigi nur tion senditan de la abonantoj (escepto ĉi-numera estas DEK !) kaj mi, kiel redaktanto, ne ĉiam povas trovi tempon kaj lokon en la bulteno por raporti pri ĉio raportenda. En Golfech estis pluraj aliaj legantoj de "Laŭte!". Nur Roza sendis ion. Tio aperas. En Plogoff (Bretonio) nun, certe estas ankaŭ esperantistoj. Sed la E-gazetaro ne povas pri ĉio raporti, eĉ ne pri la gravega problemo de atomcentraloj. Se nur en Francio, "oni" freneze

projektas funkciigi ĉ. 200 reaktorojn en ĉiuj anguloj de la lando ! Pri Golfech "Laŭte!" aperigis "dosieron" okaze de la SAT-kongreso en Lekturo, kie fakte oni longe pri-debatis la problemon de atomcentraloj. La broŝurservo aperigis du broŝurojn : "Atomcentraloj" kaj "Katastrofplano pri Fessenheim". Jen modesta, sed konkreta kontribuo nia. Ĉiuj artikoloj estas bonvenaj en "Laŭte!", eĉ tiuj, kiujn ne verkas la redaktanto, fulmotondro ! Kribo.

*************************************************************

Nia krimfelietono : Pro iniciato de Jean-Marie CARO, deputito de Malalta Elzaco, 18 deputitoj de la reganta partio UDF deponis ĉe la nacia asembleo de la Franca Respubliko leĝproponon celantan malpermesi fabrikadon, importadon kaj vendadon de ludiloj imitantaj armilojn.
Sugesto : la UDF-partio malpermesu ankaŭ al plenaĝuloj ludi per armiloj.
Lernantoj kaj lernantinoj de turkaj lernejoj ricevos kun 7 jaroj instruon pri la defendscienco, kaj ekde la 15-jara aĝo ili lernos la uzadon de armiloj. Tiu dekreto estis farita pro grava premo de la generaloj. La gazetoj malkvietiĝas, skribante, ke tiu antaŭmilitarista preparado liveros la lernantaron al kreskonta influo de ekstremaj politikaj ideoj, kaj parolas pri "hitlerjunularo".

*************************************************************

Legindaĵo (ve, nur en la franca !) :

Panaït Istrati : Vers l'autre flamme (al la alia flamo), en poŝ-eldono "10/18". Ĵus aperis la libro de Panaït Istrati, verkita post vojaĝo en Sovetion okaze de la deka dat-reveno de la oktobra revolucio en 1927. Panaït Istrati foriris entuziasme("al la alia flamo!"), sed li estis rapide seniluziigita, vidante la naskiĝon de la burokratisma subpremo kaj de la maljusteco en la "lando de la proletoj". Kun sia kutima vigleco li denuncis la faktojn, kiujn li konstatis. Li estis kalumniata fare de la francaj kompartianoj, kiuj akuzis lin esti ano de la rumana polico. Kvindek jarojn antaŭ Solĵenicin oni ĉeestas al la naskiĝo de la "gulago". J.G.



VIVO de "Laŭte!"

Ĝis la fino de februaro '80 ni registris 239 abonojn, do jam iom pli ol por la tuta jaro 1979. Ĉar kelkaj personoj kutime reabonas meze de la jaro, ni povas antaŭvidi ĝeneralan kreskon de la abonantaro ĝis ĉ. 250 minimume. Apartan dankon al tiuj, kiuj donacis abono(j)n al amikoj, eĉ nekonatoj. Jes ! Ankaŭ "Laŭte!" ĝuas helpon de kelkaj mecenatoj...

Financa bilanco por 1979 :

| | | | |
|---|---|---|---|
| Abonoj | 2749.00 | Presado | 1742.70 |
| Donacoj | 296.50 | Afranko | 618.37 |
| Aliaj | 7.00 | Aliaj | 30.80 |
| Sume | 3052.50 | Sume | 2391.87 |

Saldo: + 618.68 Profito en 1979 : + 660.63.
Saldo la 1.1.80 : 1279.31

***

Broŝurservo de S.A.T.

Bilanco de SAT-broŝurservo - 1979.
********************************

Abonantaro : 91. (Sed la abonmono de la hispanaj abonantoj neniam atingis nin. Ĉu ĝi restis ĉe LJP-centro ?)

Spezoj (en francaj frankoj)

| | | |
|---|---|---|
| Vendado + monprovizoj | 12694.47 | + 12808.97 |
| Donacoj | 40. | |
| Diversaĵoj | 74.50 | |
| Eldonkostoj | 11471.30 | - 12825.70 |
| Afranko | 1204.80 | |
| Transĝiroj | 149.60 | |

Jara bilanco : - 16,73. Pasintjara saldo (1978): 5890.88. Nova saldo la 31.12.79 : 5874.15. La stoko da vendotaj broŝuroj sumas pli ol 10 000 FF kaj entenas la jenan jarkolekton "1980" : KP,KF,SS,BG,AR2.

Krom la ĉiam malfacila mon-problemo, la broŝurservo devis solvi alispecan problemon, nome jenan demandon :

## Sub kiu (kies) ŝildo ?

Jam de unu jaro aperas en "Laŭte!" regula rubriko pri la aktiveco de la broŝurservo. Pro la tro malofta apero de la gazeto "La Juna Penso", en kies kadro ĝis nun aperadis la broŝuroj, ne plu eblas uzi tiun rimedon por informi.
Ni do aperigas tiun ĉi bilancon en "Laŭte!", kies numeron ricevos ĉiuj broŝurabonantoj.
Por la estonta apero de la broŝuroj ni esploris kaj fine adoptis,kun la konsento de la leĝa responsulo de "Laŭte!", la eblecon publikigi ilin sub la respondeco de Aĝenia E-Rondo. Jam aperas nun la du unuaj broŝuroj sub tiu ŝildo : "Kiel diri...?" (la 172-paĝa E-frazeologio kompilita de kdo LENTAIGNE) kaj "La Aperoj de Ahasvero" (Han Riner, tr. VALO). La abonantaro ne surpriziĝu do pri la modifo.
Cetere, nenio ŝanĝiĝas pri la funkciado de la servo.
Provizore, la adreso kaj poŝtkonto restas tiuj de "La Juna Penso", 3374 04 M Bordeaux. Definitiva solvo estos oficialigita fine de 1980.

### Eldonoj

La abonantoj, kies monprovizo estas sufiĉa (almenaŭ 12, aŭ 24 FF) tuj ricevos la du ĵus aperintajn broŝurojn (DI + AA) aŭ nur DI. Kiuj deziras pluricevi senmanke ĉiujn novaĵojn, tiuj bonvolu provizi : minimume 50 FF al la ĉi-supra pĉk. Ili ĝuos, kiel kutime, 20 % da rabato.
Pluraj aliaj manuskriptoj estas anoncitaj, kies eldonado dependos de la stato de la kaso fine de 1980. Venonta eldonado : "Sepdek jaroj sub la verda stelo" de kdo VALO. (la tria volumeto de la aŭtobiografio de nia amiko).

### Estonteco de la broŝurservo

Tiu servo ne estu ligita al la ekzisto kaj laborkapablo de ununura persono disponanta tre modestan presmaterialon kaj havanta eble ne tre modernajn konceptojn ! Tial mi volonte transdonos la aferon tuj kiam alia persono - preferinde grupeto el 3 aŭ 4!- estos preta ĝin transpreni. Mi komprenеble ne volas subite forlasi, sed preferas jam de nun anonci, ke la ŝvitposteno estas facile cedebla al kiu(j) deziras konkrete labori por pli inda eldonfako en SAT. Al tiu(j) - se necese - mi volonte helpos diversmaniere.

Kribo.



## Ĉe la broŝurservo

"Kiel diri...?", Praktika Esperanta Frazeologio (5000 esprimoj). Kompilis kdo Lentaigne. 172 paĝoj. Vendkondiĉoj: 15 FF (kun afranko). 20% da rabato por minimume 5-ekzemplera mendo.
Ekstraktoj el la enkonduko de kdo LENTAIGNE:
"Nia celo estas esence pedagogia. Ni deziras krei ĉe la uzantoj la bezonon uzi tute pretajn vortkonstruojn, kaj tiel helpi ilin atingi fluan parolkapablon laŭ vere zamenhofa stilo.
Por tio ni provizas ilin per materialo relative abunda, en kiu ili trovos verŝajne la eblon solvi multajn problemojn. (...)La esprimoj estas kliŝitaj dirmanieroj, sankciitaj de la uzado. Ili estas grupigitaj ĉirkaŭ 67 "ideoj" arbitre elektitaj, laŭ la gvidlinio : asociado de la ideoj, ĉiufoje kiam eblis.
Ĉu necesas diri, ke ĉiu povos, eĉ devos kompletigi laŭplaĉe per esprimoj pli konformaj al siaj bezonoj aŭ temperamento? Estas tre konsilinde parkerigi kiel eble plej multe el la esprimoj. Tio estas ne nur dezirindaĵo, sed ankaŭ plezuro."

**Alvoko al kiuj jam ricevis "Kiel diri...?" :**

Atentu! La freneza broŝuristo plagis! Nur fine de la broŝurigo la eldonanto-direktoro-balaisto malkovris, ke en kelkaj ekzempleroj - jam ekspeditaj - verŝajne mankas unu folio (4 paĝoj ekde ĉap.51), anstataŭita de 4 kromaj sekvantaj paĝoj dufoje enŝovitaj (ekde... por la agoniantoj). Kiuj malkovros tiun fuŝaĵon en sia(j) ekzemplero(j), tiuj bonvolu peti la mankanta(j)n folio(j)n al Laŭte, 47340 Laroque. Se vi malkovras alispecan fuŝaĵon, ne hezitu informi same, kompreneble.
Pardonpetas la kulpulo. La trafitoj ricevos kun la mankanta(j) folio(j) kompensan poŝtmarkon, aŭ alion, se temas pri eksterfrancia mendinto.

Tre rapide elĉerpiĝos la unua eldono de "Kiel diri...?". La dua eldono ne eblos antaŭ kelka tempo (superŝutiteco de la freneza ŝvitemulo). Do, ne prokrastu, prefere mendante samtempe plurajn ekzemplerojn por ŝparigi afrankon kaj mem ĝui 20% da rabato.

Han Riner : La Aperoj de Ahasvero, trad. Valo. 172 paĝoj. 15 FF.

Jen plia juvelo el la ampleksa verkaro de Han Riner. La libro konsistas el dek-unu ĉapitroj, t.e. 11 "aperoj" de Ahasvero, la Vaganta Judo, antaŭ famaj historiaj figuroj (Seneko, Mark-Aŭrelio, La Boesio, Galilejo, k.a.) aŭ al personaĵoj elpensitaj de la aŭtoro (Neo-Stoikus, Festiva, Simplicio), kun kiuj elvolviĝas dialogoj pri la plej diversaj temoj filozofiaj : la morto, la tempo kaj spaco, la potenco, la ribelo, la memvola servuto, k.a. Jen do profunda, ne tre facila legaĵo, malgraŭ la vigla stilo de Han Riner, kiun tute ne perfidas la mirinde klara lingvo de la tradukinto. Sed kia spirita ĝuo ! Al kiuj plaĉis la belega "Kvina Evangelio" (nun elĉerpita en sia esperanto-vesto), tiuj certe ne volos maltrafi tiun novan ĉefverkon.

Por abonantoj aŭ abonontoj de la broŝurservo:

▷ Vi estas broŝurabonanto. Restas en via konto [ ] FF

▷ Vi ne estas broŝurabonanto, sed deziras ricevi ekde 1980 ĉiujn novajn broŝurojn kun 20% da rabato ĝis elĉerpiĝo de la monprovizo.(*)

Ambaŭkaze, ni petas minimuman monprovizon je 50 FF al jena poŝtkonto : La Juna Penso, 3374 04 M Bordeaux.
Dankon.

(*)Listo de la broŝuroj kun dato "1980" :

- Katastrofplano por Fessenheim. Verdikto pri Wyhl
- Sindikatismo - Sovetoj (Anton Pannekoek)
- Kontraŭflue (Valo)
- La blankaj gardistoj (Heiligstein)
- Argentina novelaro (dua kolekto)
- Kiel diri...? (Komp. Lentaigne)
- La aperoj de Ahasvero (Han Riner)

kaj post kelkaj monatoj :
- Sepdek jaroj sub la verda stelo (Valo)

Valoro : 64 FF. Al abonantoj : 51,20 FF afrankite.

La venonta numero de "Laŭte!" aperos meze de aprilo.



Nia pasintjara felietono :

TRA EŬROPO per FERVOJO kaj ESPERANTO...

Vieno

Vendredon la 14an de decembro 1979 post mia laboro, mi eliris el la stacidomo plej proksima de mia loĝejo, tiu de Kehl en Germanio. En la kuŝejkupeo mi diskutis kun viro duone bavara duone aŭstra, kiu iam estis militkaptita en Loreno, pri komparataj meritoj kaj kulturoj de lorena, elzaca, germana kaj aŭstra popoloj. Pro sia persona historio, tiu viro ŝatis nek germanojn nek lorenanojn. Post tiu diskutado, mi dormis, ĝis ni alvenis frue matene en la neĝkovrita Vieno.

Mi iris al la junulara hejmo en Reichapfelgasse, en kiu kdo Mosek estis afable rezervinta ĉambron por mi. Tiu hejmo estas tute nova, komforta kaj relative malmultekosta. Post tualeto kaj aranĝado mi iris viziti kdon Mosek, kiu loĝas en la sama strateto. Mi trovis lin piede de sia ŝtuparo kun aĉetreto. Afable li montris al mi la buson al Ringstrato, kaj donis al mi biletojn. Ni rendevuis por la 3a horo posttagmeze, por ke li veturigu min al la Zamenhofa festo, kiu okazis en Vieno la 15an de decembro en la pola instituto, apud preĝejo Maria am Gestade.

Ne utilas, ke mi detale priskribu ĉiujn monumentojn, kiujn mi vidis sur Ringstrato, ĉar libroj kun fotoj pri Vieno abundas en bibliotekoj, kaj, se vi petos ĝin, certe la turisma informejo de Vieno sendos al vi informilojn, sed mi ne scias, ĉu ili estas haveblaj ankaŭ en Esperanto.
Mi mencias nur, ke tiu Ringstrato pruvas, ke imperiestro Francisko-Josefo kaj lia kuzino-edzino princino Elisabeth en Bavario, nomita Sissi en romanoj kun ne tre garantiita historia valoro, havis multege da mono, kaj nepre volis, ke sciu tion ĉiuj iliaj regatoj. Ĉar pluvis, mi eniris en la muzeon pri arthistorio. Ĝian stilon oni ne povas ŝati, kiam oni ŝatas cistercistilajn abatejojn, sed kun granda miro mi eksciis, ke estas en tiu muzeo unu salono nur pri Bruegel, kun pentraĵoj pri Flandrio aŭ pri bibliaj temoj (ekzemple la turo de Babelo), unu salono nur kun geinfantoj de Velasquez, kaj pentraĵoj de multaj famaj artistoj
/

kaj skoloj. Malgraŭ la stilo de la konstruaĵo, tiu muzeo (cetere senpaga!) estas tute vizitinda.

Post tiuj artaj emocioj, mi revenis al pli terecaj interesoj. Ĉar Vieno estas kosmopolita urbo, mi manĝis hungaran gulaŝon, aŭdante kanton de Michel Sardou. Pri la hungareco de la gulaŝo mi ne povas juĝi, sed mi estus pli bone elektinta la reprezentanton de franca kulturo !

Post la manĝo, mi aliĝis al gvidata vizito de la viena operejo. Mi demandis, ĉu estas rabato por ŝtatoficistoj de la franca ministerio pri kulturo, sed tio ne estis antaŭvidita. Eble, pro ĝia fama riĉeco, eĉ la ekzisto de tia ministerio en Francio ne estas konata. Estis unu germanlingva gvidisto, kaj unu gvidistino samtempe por franclingvanoj kaj anglalingvanoj. Ĉar montriĝis, ke mi estas la nura franclingva vizitantino, mi diris al la gvidistino, ke, por ne doni al ŝi duoble pli da laboro, mi aliĝos al la germanlingva grupo. Mi eksciis multon interesan por la operejo, interalie, ke, kiam renkontiĝas ŝtatestroj en Vieno, ili ne enmerdiĝas, kiel maldecе sed elkore dirus francaj impostpagantoj. Nu ja, se viena kulturo (kaj alkoholo) povas repacigi sinjorojn Carter kaj Brejnev, indas labori por Kulturo ! Kompreneble, luksa sidloko en la viena operejo kostas multon, sed vienaj senlaboruloj povas spekti operojn paginte malmulton kaj... starante.

Post tiu vizito mi volis iri al sinjoro Mosek, sed mi eraris pri la bushaltejo, poste ne facile retrovis la strateton, tiel ke, kiam mi alvenis, li jam estis for. Mi reiris al la urbocentro, kaj provis trovi la preĝejon Maria am Gestade, sed ankoraŭ tiam mi eraris pri la vojo, la nokto venis pli frue, ol mi ĝin atendis, kaj mi estis laca pro la antaŭa nokto en trajno, tial mi rezignis. Do mi tre bedaŭras, ke mi ne povas multon diri pri la Esperanto-grupo en Vieno. Ŝajne kunestas en ĝi aŭstroj kaj poloj, ĉefe maljunuloj.

La duan tagon, la 16an de decembro, mi devis viziti sinjorinon Schmudermayer, amikinon de la korespondantino (ne esperantista) de bofratino mia (*).

--------

(*)Noto por francoj : ne, mi ne estas bretona, mi estas burbonia kaj iom aŭverna, kial ?



Ĉar mi ne sciis, ĝis la kioma horo ŝi dormas dimanĉmatene, mi unue iris promeni sur Ringstrato. Mi vidis ŝildon, kiu mencias la Esperanto-muzeon, sed ĝi estis fermita. Mi ridetis, kiam mi vidis, ke sur la urbodoma placo en Vieno estas iu "Christkindlmarkt", ĉar samtempe sur la urbodoma placo en Strasburgo estis iu "Christkundlmerik". En ambaŭ bazaroj, ĉu "Markt", ĉu "Merik", oni povis aĉeti ĉion necesan por digne festi la ĝojan naskiĝon de la "kristinfaneto. Sed en la urbodomo de Strasburgo estis ekspozicio pri generalo De Gaulle, kaj en la urbodomo de Vieno ekspozicio de ludiloj. Kvankam ambaŭ estis senpagaj, mi preferis la duan. Iom antaŭ la tagmezo, mi alvenis en la domo de gesinjoroj Schmudermayer, apud la urba ĝardeno, kaj la pordisto certigis al mi, ke estas neniu sinjorino Schmudermayer en la domo, sed finfine mi trovis sen lia helpo tutan familion da Schmudermayer-uloj, t.e. junan patron, junan patrinon, kaj ankoraŭ pli junan bebon. Ni tagmanĝis, kaj, ĉar sinjoro Schmudermayer estis havonta ekzamenon la morgaŭon, por lin lasi ĝin trankvile prepari, sinjorino Schmudermayer iris promenigi la bebon kaj min en la juda kvartalo, kaj apud tiu preĝejo Maria am Gestade, kiun la antaŭan tagon mi ne povis ĝustatempe trovi. Ĝi estas gotika preĝejo, kiu post la ringstrata stilo estas ripoziga. Ankaŭ la katedralo de sankta Stefano estis gotika, sed poste oni barokigis la internon.

Vespere ni iom babilis, mi montris al ge-Schmudermayer la elzacajn diskojn, kiujn mi portis por miaj gastigontoj, dirante, ke, ĉar ili estas la unuaj, ili povas elekti. Ni aŭdis ĉiujn diskojn, kaj finfine ili prenis tiun de Jean DENTINGER kun mezepokaj kantoj el Elzaco, ĉar la tekstojn ili pli facile povis kompreni. Sinjoro Schmudermayer ne tre bone sciis, kie Strasburgo estas, ŝajne estas por germanlingvano malfacile imagi, ke granda franca urbo povas situi ĉe Rejno. "Ha jes, diris li, tio estas en Elzaco-Loreno", sed mi citis al li la faman elzacan proverbon "Dio gardu nin de lorenanoj!" Li ankaŭ demandis min, ĉu mi venis per aviadilo, sed mi respondis, ke la distanco tian elspezon ne bezonigas. Mi iom ridetis, ĉar kelkajn monatojn antaŭe mia frato kaj mi, per geografiaj kaj matematikaj konsideroj, pruvis al nia patrino, iom malkvieta pro mia projekto iri al Jugoslavio, ke de Strasburgo Rijeka estas

pli proksima ol Bulonjo-ĉe-maro (sed ne estas rekta trajno). Troa konsidero de ŝtatlimoj ofte donas al homoj malĝustajn ideojn pri geografiaj realoj. Vespere, dum ŝia edzo plu penis por sia ekzameno gardante la dormantan bebon, sinjorino Schmudermayer kondukis min al teatro, kie estis komedio "Geedziĝo" de Gogol. Mi miris, ke en Vieno teatro komenciĝas je la 7a, tiel ke multe pli frue ol en Francio finiĝas la spektaklo.

Frue matene mi dankis al sinjorino Schmudermayer, kaj esprimis al ŝi la deziron, ke ŝia edzo rompu al si la kolon kaj kruron, laŭ germanlingva kutimo malpli maldeca ol la kutima salutvorto al francaj ekzameniĝontoj. Per tramo mi alvenis je la 6a horo en la suda stacidomo.

Jakelino.

(daŭrigota, kiel ĉiuj veraj felietonoj)

**************************************************************

Antoni Madej : "ESPERANTO-GRAMOJ"

Defendo de Babelturo

Ni ne disbatu murojn
De la Babela Turo.
Ni nur malfermu pordon
Kaj ekmarŝu laŭ ordo !

Ofta opinio

Ne ĉiu verk' interesa
Estas vere necesa.

Pri ĥimeroj

Diversaj estas ĥimeroj
Pro mensogo kaj espero.

Homa destino

Jam tia estas homa destino
Plej facile iĝi patro kaj patrino.

x x x

Belas realo
sed sen vualo.

Nova peranto de "Laŭte!": José Mª Bernabéu Franco
G. Primo de Rivera, 6 - CALLOSA DE SEGURA (Alicante)
HISPANIO



Nia kutima felietono : TRA LA MONDO PER BICIKLO...
********************

Vendredon 31an de majo 1929 : Jam de tri tagoj mi forlasis Niĵni Novgorod. Mi biciklas al KAZAN en tre bela, valoplena regiono. Vojo ? Ne ekzistas ! La tervojo sekvas la telefonajn aŭ elektrajn liniojn. Tie ĉi preskaŭ laŭlonge de la tuta pado troviĝas arboj, kiuj plejofte estis falsegitaj dum la revolucio. Ofte estas betularo, sed ankaŭ ofte la kamparanoj fosas por planti terpomojn. En multaj vilaĝoj mi ankoraŭ trovas skipojn el laŭlong-segistoj, kio klarigas, ke la maŝinismo ankoraŭ ne apartenas al la moroj. En la vilaĝoj oni ankoraŭ ofte renkontas maljunulinojn ŝpinantajn per sia ŝpinilo kaj sia lantufo ĉe la pinto de bastono. Per tiuj fadenoj ili fabrikas krudan tolon.
Ĉiuj vilaĝaj domoj estas el ligno, kompreneble. La ĉarpentistoj estas veraj artistoj, kiujn mi mem, ĉarpentisto, admiras preterpasante. La dommuroj konsistas el arbotrunkoj senŝeligitaj, entranĉitaj kaj kunigitaj hirundvoste ĉe la eksteraj anguloj. La interspaco inter ĉiuj trunkoj estas ŝtopita per musko, kio faras likimunajn murojn, fortikajn kaj varmizolajn. La ekstero de la fasadoj estas ornamita per skulptaĵoj en la ligno sur la pinjonoj kaj ĉirkaŭ la fenestroj.

Noto : Mi devenas de la ĉirkaŭaĵo de la Landezia departemento en Francio kaj mia avo estis arbohakisto kaj mi ĉarpentisto. Tial tiu laboro aparte interesas min, des pli ke oni ne konstruas en mia regiono lignodometojn el tia stilo, kiu pli respondas la stilon de la montaraj ĉaledoj. Iuj ĉaledoj estas veraj ĉefverkoj el skluptaĵoj kaj lignoornamoj hake prilaboritaj. La tegolon anstataŭas "ardezoj" el ligno surloke preparitaj fare de rimarkinde lertaj laboristoj, kaj arte lokitaj. Poste, la diversaj partoj de tiuj domoj, ankaŭ la tegmentoj, estas ornamitaj per diversaj ŝmirkoloroj, kiuj donas al ili eksterordinaran stampon. La interno estas samstila kaj la lignaĵoj estas vernisitaj, krom la plankoj, kiuj restas senmakule blankaj aŭ estas brune ŝmiritaj.
Ekde tiam, en la tuta Siberio, mi trovis tiustilajn domojn, kiuj, laŭ mi, havas nur unu malavantaĝon : ili estas flamiĝemaj. Sed ili estas mirinde komfortaj : somere ili estas

malvarmetaj kaj vintre tre varmaj kun siaj duoblaj fenestroj kaj duoblaj enirpordoj formantaj vestiblojn.

***

KAZANO, ĉefurbo de la Tartara Respubliko.

Antaŭ ol alveni, mi devas plian fojon transiri Volgon. Alveninte ĉe la pontkomenco, mi estas aklamata de la gardantaj soldatoj. (Ĉiuj gravaj konstruaĵoj estas soldate gardataj tie en Sovetio, ĉar oni ĉiam timas la intervenon de sturmantoj el blankaj partizanoj). Antaŭ ol mi transiros la riveregon, ili proponas bonan manĝon al mi : supon, kaĉon el nigra tritiko (mi supozas...). Kaj mi disvendas kartojn. Kiam mi estas satigita, ili vizitigas al mi sian kantonmenton, kiu similas palaceton puran kaj komfortan.
La ponto trans Volgo estas almenaŭ unukilometron longa kaj el fero ; necesas almenaŭ 10 minutoj por transiri sub tre forta vento. Post la ponto komenciĝas por mi la malfacilaĵo, ĉar la vojo estas preskaŭ ĉie inundita. Mi estas devigata forlasi ĝin kaj trabati vojon al mi en la arbaro. Fine, ĉirkaŭ la 18a mi atingas Kazanon, ankaŭ parte inunditan.

Merkredon, 5an de junio 1929.

Kamarado A. akompanas min. Li flue parolas esperanton. Ni iras al la laborejo de mekanikaj riparadoj. Mi dezirus konstrui aparaton ebligantan bicikli sur reloj. Pli-malpli bone mi laŭskale planis ĝin.
Kompreneble, kvankam la Direkcio akceptis min, ĝi ĉiel kontraŭdiras al mia projekto. Oni konsideras min ne nur kiel originalulon, sed ankaŭ kiel duonfrenezulon, ĉar pretendi bicikli sur la Transsiberiaj reloj, vere tio estas transiri la limon, kaj tamen...

(Kaj tamen...) Post unu monato da streĉa laboro, dimanĉe la 30an de junio 1929, mi fine sukcesis forlasi Kazanon per mia aparato, venkinte ĉiujn materiajn kaj oficialajn barojn por ĝin konstrui kaj por akiri la permeson tiel vojaĝi. Min helpis kun kortuŝa sindonemo kaj fervoro ĉiuj esperantistoj de Kazano. Ĉefe al Fraŭlino Kisilova kaj S-ro Anonimov mi ŝuldas multon.

Jen la plej grava venko, kiun mi havis en Sovetio !

(daŭrigota) ALFA-BETA.



Boris Vian :

La Lampisto estas la vera kulpulo ! (*)

Ĉu generalo sen soldatoj estas danĝera ?
Ĉu komisaro aŭ polica prefekto sen policistoj ?
Ĉu Papo sen ĉefepiskopoj, kaj sen pastroj ?
Da tiuj mi bonvolas !
La Angloj bone scias, ke reĝo sen potenco estas mirinde sendanĝera !
Sed unu "lampisto" estas aganta forto.
Cent lampistoj estas danĝeraj por la individuo.
Cent miloj da lampistoj sufiĉas por milito.
Cent milionoj da lampistoj faras la malfeliĉon de la homaro.
La direktoro de la fervoja kompanio ne havas la eblecon elreligi vagonaron per sia propra potenco. Por sukcesi li devos transformiĝi en relkomutiston, aŭ en lampiston kaj inversigi la signalojn.
Sed relkomutisto, kia elekta posteno !
Hitler tute sola ! Mirinda spektaklo !
Sed okdek kvin milionoj da lampistoj malantaŭ li, jen finitaj la amuzaĵoj !
Hitler estas morta. Sed la lampistoj restas.
Kaj provas sin montri tiel sendanĝeraj,
Kiel ĉiuj lampistoj de la tuta mondo !
Inter si la lampistoj malamikas, sed kunigitaj ili prenas la nomon popolo kaj fariĝas nevenkeblaj !
La individuismo de la popolo estas la nura defendo
Kontraŭ la lampisto. La lampisto tion bone scias !
Se en la ŝiparo ĉiuj estas admiraloj, jen finitaj la marbataloj !

(*) En la franca lingvo, la lampisto estas la oficisto, kiu iam respondecis pri la lampoj kaj lanternoj en la stacidomo. Sed oni uzas tiun vorton por difini la plej malaltan subulon en la socia hierarkio. J.G.

En Francio : La leĝpropono, iam deponita ĉe la Nacia Asembleo de la franca respubliko, estis denove registrita por eventuala pridiskutado sub la numero 1550 la 19an de dec. 1979. Ĝin prezentas la membroj de la socialista partio kaj de M.R.G. (Movado de la Maldekstraj Radikaluloj). La nova dokumento estis afable komunikita al "Laŭte!" fare de amiko M. TRENNER, Parizo, kiun ni kore dankas.

Directeur:Simonet.Imprimeur:Baudé,47340 Laroque.CPPAP 58651.

## V I V O en la E S P E R A N T O - G R U P O J

***************************************************

* Regiona renkontiĝo en GUJAN-MESTRAS (17/18.majo 1980) :

Kiel anoncite en "Laŭte" n°20, la E-Asocio de Guĵan-Mestras (Ĝirondio), kun la apogo de la Ĝirondia Laborista E-Grupo, organizos regionan renkontiĝon en Guĵan-Mestras. Ĝi okazos sabate 17an kaj dimanĉe 18an de majo en la urba festsalono.

La kompleta tagordo estos farata surloke, sed de nun jen plej grava parto :

Sabate, je la 15a : ekzameno por la atestoj pri lernado kaj praktika lernado. Poste, laŭplaĉe, vizito al la ornitologia parko, aŭ al la metiista vilaĝo. Post la vespermanĝo projekciado de lumbildoj.

Dimanĉe, je la 9a : Eventuale, ekzameno por la malfruiĝintoj kaj ĝenerala kunveno. Je la 11a ostrogustumo kaj honorvino, kies prezidanto estos sendube la urbestro.

Nia samideano S-ro Lavandier, hotel-restoraciestro, proponas la sekvantajn prezojn :

Tagmanĝo : 35 F. Vespermanĝo : 35 F.
Tranokto kaj matenmanĝo : 35 F.

Pri tranokto bonvolu sendi partopagon aŭ la tutan sumon per bank- aŭ poŝtĉeko al P. Sevilla, 108, cours de la Marne, 33470 GUJAN-MESTRAS.

Tendumantoj povos tendumi senpage ĉe tiu adreso aŭ en la urba kampadejo, pagante.

Atentu! Por la bona funkciigo de nia organizado ni respondecos nur pri tiuj, kiuj sin anoncos antaŭ la 30a de aprilo (lasta limdato).

P. Sevilla.

* La vivo en Ĝirondio : La malvarma vetero malkuraĝigis, sendube, plurajn grupanojn. Tamen ni esperantumis... Ni parolis pri la "Muelejoj de la Metilernantoj", ĉar ni ricevis alvokon de la respondeculo. Li ŝatus, ke esperantistoj kunvenu en la Muelejoj dum la venonta somero. Kaj kelkaj esperantistoj povus instrui E-on al la gejunuloj, kiuj laboras en la Muelejoj.

- Pri nia rilato kun la Munkena E-grupo, ni decidis aĉeti lumbildojn pri Bordozo kaj registri kasedon... kaj sendi la tuton al Munkeno.
- Ni tuj mendos al Leo Lentaigne unu lumbildserion por varbi

por Esp-o kaj dek "Kiel diri...?".
.Grava okazaĵo ! Nia grupeto ekspozicios de la 10a ĝis la 16a de marto, en la librovendejo "La Machine à lire", 13, rue de la Devise, BORDEAUX.
.Santa Domingo ! Rolando Levreaud rakontis sian laboron kun Internacia Civila Servo. Dum unu monato li restis surloke, konstruante dometojn, helpante morale la lokan loĝantaron.
.Nia Marta kunveno okazos en CENON-Palmer, la 22an de marto je la 15a horo. Joël.

* En la Muelejoj de Metilernantoj :
******************************

ALVOKO al maljunaj geesperantistoj, kiuj pro emeritiĝo havas pli da libera tempo ol gejunuloj por dediĉi al E.
Temas pri la revigligo de esperanto en la(M.d.A.)muelejoj de metilernantoj.
Hans Bakker (Amsterdamo) kaj mi promesis unu la alian fari nian plejeblon.
La direktoro de la M.d.A. konsentis la starigon de la ESPERANTO-pavilono en Piot. Necesas organizado por instali, gardi kaj deĵori en tiu ekspoziciejo.
Due, la direktoro disponigos al ni la muelejon "Malval", tute speciale por la esperantistoj.

Ĉar bedaŭrinde la junuloj ne havas tempon por prepari tiun muelejon, mi petas la helpon de pensiuloj. Mem mi estas preta labori tie en 1980 de pasko ĝis la fino de aŭgusto, sed mi ne sugestas, ke oni faru same. Plaĉus al mi, se dum tiu periodo ĉiufoje kelkaj gekamaradoj venu semajnon por labori kun mi. Bonvolemuloj anoncu sin ĉe mi kaj kune ni planos kaj gvidos la laborojn farendajn, memstare kaj en harmonio kun niaj kapabloj.
Skribu al : D. Captein, Novasent', Gaydelle bas,
St Pastour, F 47290 Cancon, Francio. Tel.(58)01.67.81.

* Mi serĉas Sennaciulinon por la ferioj en Aŭgusto 1980 por tre bela, tre sennacieca, tre plezura vojaĝo. Mia adreso : Alessandro PANERAI, strato Pistoiese N 457, I 50010 CAMPI BISENZIO (FI), Italio, tel: 055/8998893.

* Kongreso de la Federacio Langvedoko-Rusiljono : ĝi okazos
******************************************
la dimanĉon 13an de Aprilo 1980 en Béziers. Ĉiujn informojn donas S-ino Authier, 9 r.G.Picot, 34500 Béziers, F.

* Esperanto-Kunveno sur Larzako :
*****************************

La 15an kaj 16an de marto okazos en Montredon (Larzak) renkontiĝo inter esperantistoj kaj loĝantoj de Larzako. Temas pri informkunveno pri esperanto. Estus bone, ke ni venu multnombraj por diskuti.
Eblos loĝi surloke, en la domo "Larzak-Universitato". Sed la partoprenantoj devos alporti ĉion necesan por dormi kaj sin nutri. Estos du ĉefaj kunvenoj : sabaton vespere kaj dimanĉon matene.

* Larzak-informoj : vidu p.2 !

* Nova Esperanto-Klubo en la franca departemento Pyrénées-Atlantiques :

S-ro Roberto LLoancy, lernanto de Llech-Walter en liceo de Perpignan dum 1961, nun profesoro en la Kolegio de Bizanos (64320) fondis en tiu urbeto (apud Pau) Esperanto-Klubon.
Deko da gejunuloj jam aliĝis kaj partoprenis la Zamenhofan feston la 15an de Decembro. Nova adreso de gesinjoroj Lloancy : 5 rue Léonard Constant, 64000 PAU (Francio).

* Tri prelegoj en 2 monatoj :
*************************

La Esperantista Kultura Centro en Perpignan 66000 (Francio) 72, av. du Général de Gaulle, organizis tri publikajn prelegojn en Novembro kaj Decembro.
La unuan faris S-ro Van Heugten, nederlandano, en Palaco de la kongresoj, pri Nederlando per belaj diapozitivoj. S-ro Boumal, belgo, tradukis france.
La duan faris la juna japano Hirai Jukio, pri la esp-ista movado en Japanio kaj Sudkoreio ĉe la Kataluna Kultura Centro. Tradukis france kaj katalune S-ro Llech-Walter.
La trian faris advokato Abecassis la 15an de Decembro, pri Doktoro Zamenhof, ĉe la sidejo de la Centro.

* Aĝenio : E-kurso plu okazas pli-malpli bone en la kultur-
****** centro de Villeneuve-sur-Lot. Tri fidelaj lernantoj daŭrigas kaj finfine kuraĝas babili...
Aliaj E-kursoj : en Tonneins kaj Clairac.
Ni memorigas, ke tuj kiam AERA-ano deziras aranĝi informkunvenon, li(ŝi) skribu al la sidejo aŭ telefonu : tiam

ni kunvokas la tutan grupon por helpi kaj tiuokaze pritrakti ankaŭ la grup-aferojn.

* Alta Elzaco : La 11a staĝo de "Esperanto parolata" okazos
***********
la 14an kaj 15an de junio 1980 en "Ried et Hardt", F 68230 SOULTZBACH. Informos : Edmondo LUDWIG, 46 route de la Schlucht, STOSSWIHR, F 60140 MUNSTER.

* SARLANDO : La Sarlanda Esperanto-Ligo, Schulstr. 30, D 6601
********
SCHEIDT, organizas kulturajn semajnfinojn de la 2a ĝis la 4a de majo kaj de la 26a ĝis la 28a de septembro 1980. Ĝia vigla libroservo proponas interesajn brokantajn librojn.

* Laborista E-Grupo en Tuluzo :
***************************

Ni klopodis organizi E-kurson, sed verŝajne pro misorganizo, ni ne sukcesis starigi ĝin. Ni algluis kelkajn afiŝojn, ĉar la kluba kaso ne ebligas pli. Informojn pri la kurso ni aperigis ankaŭ en "La Dépêche". Cetere ni varbis antaŭ la universitato kaj havis budon en la festo de "Lutte ouvrière". Ni ricevis multajn informpetojn, preskaŭ ĉiuj de gejunuloj aŭ 30-jaruloj. Pluraj intencas partopreni la kurson. Sed ili sin anoncis tre malfrue, kaj pluraj ne loĝas en Tuluzo. Ni direktis ilin al la perkoresponda kurso de kdo Martin. (...) La eksperimento estis iel lerniga. Ĝi pruvis, ke junaj interesatoj ne mankas.

* Katalunio : Okaze de la oficiala inaŭguro de la avenuo
*********
Zamenhof en Sabadell (Barcelono) kunvenis preskaŭ 5000 personoj. Tiu strato estis iam la unua dediĉita al la kreinto de la internacia lingvo. Post la hispana revolucio ĝia nomo ŝanĝiĝis al tiu de generalisimo Franco, kaj post 42 jaroj denove oni inaŭguris la antikvan nomon. Kune kun la inaŭguro okazis ekspozicioj por la infanoj, popularaj homaj turoj kaj alvenis la urbestro kaj aliaj aŭtoritatuloj, ankaŭ la populara orkestro de la urbo. Estis granda propagando por esperanto.
Grandegan sukceson havas en Hispanio la modesta broŝuro "Esperanto en 24 páginas" eldonita de la broŝurservo. Bedaŭrinde, niaj hispanaj kamaradoj ne ĉiam povas mendi la kvanton necesan por respondi ĉiujn petojn. Helpo de alilandaj kamaradoj estus bonvena. Notu la adreson : Grupo Esperanto, Apdo.- 27066, BARCELONA, Hispanio.